NUMERO 6

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org

24 APR 2017

# NORDA ✭ KURIERO

## Junie en Lillo: somera festo kaj ekzamenoj!






La Federacio organizos la ĉiujaran ekzamensesion de la Franca Esperanto-Instituto (FEI) kun la unua kaj dua gradoj en **sabato la 10a de junio** de la **13:00** ĝis la 17:30 en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet). La kluboj kaj kandidatoj bonvolu anonci la ekzameniĝojn kiel eble plej frue al Michel Dechy*.

(* tel.: 06 16 98 41 02 – mdechy@esperanto-nord.org)

Tuj post la sesio, je la **17:30**, la Lilla klubo invitos la ekzamenitojn, lernantojn kaj esperantistojn el la tuta regiono por festi la finon de la lernojaro per sukera-sala aperitivo kun ludoj. Jen bela okazo por renkontiĝi, babili, distriĝi… kaj adiaŭi antaŭ la somero!

## En Francilio okazos la landa kongreso




La landa kongreso de Esperanto okazos **de la 25a ĝis la 28a de majo** en la francilia urbo Mandres-les-Roses (25 km sudoriente de Parizo). Ĝuu la prelegojn kaj koncertojn, malkovru la departementon kaj korpe moviĝu dank' al eksteraj sportoj por ĉiuj. La departemento Val-de-Marne famas pro siaj tavernetoj ĉe la riverbordoj, nomitaj *guinguettes*: dancu je la sono de francilia grupo da muzikistoj!

Sciu pli kaj aliĝu al la landa kongreso per la retejo: www.kongreso2017.esperanto-france.org

# Gustumu la Orientfrisajn insulojn!

La germano Helmut Klünder prelegos **vendredon la 28an de aprilo 2017** je la 18:30 en la domo de Katja Boen en Lambersart ĉe Lillo: "La vivo sur la Orientfrisaj insuloj", kiuj troviĝas marborde de Germanio.

Lia prelego estos soci-geografia multmedia prezento por okuloj, nazo, lango, stomako kaj hepato. Vi malkovros la fenomenon de migrantaj insuloj, la funkciadon de la tajdo, la specifajn vivkondiĉojn sur tiuj insuloj, kaj diversajn fotojn. Helmut Klünder indikas: *"Ĉar mian prelegon oni ne povas sobre toleri, region-specifaj trinkaĵoj dum la prelego estos servataj!"* La daŭro de la prelego estas nedefinita: ĉi tiu finiĝos, kiam ĉiuj boteloj estos malplenaj!




*Helmut Klünder sur strando de unu el la Orientfrisaj insuloj*

# Promenu en la Flandraj Ardenoj



La Kortrejka klubo okazigos la ĉiujaran Tago de la Flandraj Ardenoj dum **dimanĉo la 30a de aprilo**. Ekde la 9:00 la grupo promenos tra la arbaro Sint-Pieters kun ĉiĉerono, kaj posttagmeze ĝuos kultur-historian viziton de la urbo Ellezelles. Vi povas aliĝi per retletero al: piet.glorieux@gmail.com

# En Araso duoble ekspoziciiĝis Esperanto!




Sabaton la 8an de aprilo la Arasa klubo inaŭguris du ekspoziciojn en la Arasa Kultura Oficejo:

– "Lingva Diverseco kaj Esperanto" kaj
– "Esperanto dum la Unua Mondmilito".

Tiu aranĝo okazis kadre de la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof. Ĉeestis proksimume 30 homoj esperantistaj kaj neesperantistaj, kiuj fine trinkis en amikeca etoso. Ambaŭ ekspozicioj staris en la Oficejo ĝis la 19a de aprilo.

# Duncan Charters prelegvojaĝis niaregione





Duncan Charters vojaĝis en Eŭropo prelegante en diversaj urboj. Tiukadre li restadis en Lillo dum tri tagoj, de la 11ª ĝis la 13ª de marto.

Sabate li prelegis en MRES (Lillo) pri "Kial Prezidento Trump?" antaŭ 30 atentaj homoj esperantistaj kaj neesperantistaj. La preleganto kelkfoje uzis iom fakajn vortojn rilate usonan politikon, sed Xavier Dewidehem plej kontentige tradukis por komencantoj kaj la neesperantistoj. Inter la motivoj, kiuj kondukis al la neatendita venko de Trump, Duncan reliefigis la ĝeneralan deziron pri ŝanĝo, la malfeliĉigan senton de multaj gepatroj, ke iliaj infanoj havos pli malfacilan vivon, la malpopulareco de Hillary Clinton, ktp. Eĉ la vulgareco de la kandidato estis konsiderata kiel aŭtentecon, kaj ĉe kelkaj homoj efikis sukcese.

La Arasa klubo poste akceptis lin por prelegi pri "Kiel poliglotoj lernas lingvojn?". Tiam li emfazis pri graveco de motivado, disciplino kaj konscio pri sukceso. Ĉu ili poste hejmeniris kun la intenco




eklerni du aŭ tri novajn lingvojn? Tio estas alia demando…

La organizanto de la prelegvojaĝo atentigis nin pri la universitata laboro, kiun Duncan kunportis, konsilante lasi al li sufiĉe da libera tempo. Tamen, dimanĉe la vetero belis, kaj nia fakulo pri Lillo, Claude Longue-Épée, brile gvidis nin tra ĝiaj malnovaj kvartaloj. Ni menciis la apudecon de Bruĝo, kiun Duncan ne jam vizitis; kaj sen troa insisto nia, li diris, ke li volonte vizitos tiun urbon. Jen



mesaĝo al la bruĝa esperantisto Bart Demeyere, tuj alvenis lia jesa respondo, kaj li gvidis nin en Bruĝo! Fine, sub la elstara ĉiĉeronado de Edmond Plutniak, Duncan vizitis Arason, aparte *Carrière Wellington* por vidi plian memorlokon pri la unua mondmilito.

Konklude: elstara preleganto, belaj vizitoj, multaj renkontoj… sukcesa prelegvojaĝo!

*Redaktis: Katja Boen*

ESPÉRANTO NORD
www.esperanto-nord.org
NUMERO 6
– 24 APR 2017 –
NORDA ✯ KURIERO

# Agrablis PSI en Germanio

Estis PSI! La Printempa Semajno Internacia, de la $10^{a}$ ĝis la $17^{a}$ de aprilo en Essen (Germanio). Pli ol 80 personoj aliĝis, el diversaj eŭropaj landoj, eĉ el Kanado.

Ni loĝis sur monteto, ĝuis agrablajn ĉambrojn kaj manĝon.

La ekskursa programo estis aparte riĉa por lasi nin malkovri la novan verdan regionon Ruhr, antaŭe tre industria parto de Germanio (karbo kaj fero). Ekde la fino de la $70^{aj}$ jaroj, la naturo invitis sin ĉie tra la iamaj minejoj kaj stal-instalaĵoj: nun bele floras la arboj meze de gigantaj rustiĝantaj kamenoj aŭ aliaj konstruaĵoj.

Oni instalis ludajn kaj surgrimpeblajn parkojn. Vespere unu granda zono estas belege lumigita, kiel en feia ĝardeno.

La regiono Ruhr kreis muzeojn el antaŭa karbominejo. Ankaŭ pluraj restoracioj ofertas vastan elekton por ĉiuj.





Ni ankaŭ vizitis la vilaon de la familio Krupp, kiu fabrikis armilojn dum la militoj kaj multajn el ŝtalo konstruitajn maŝinojn, ekzemple lokomotivojn, boatojn, ĉion, kio rilatas al "peza industrio". La vilao Krupp aspektas kiel kastelo, kie oni akceptis la reĝojn kaj prezidentojn el la tuta mondo ĝis la $70^{aj}$ jaroj.

Ni agrable piede kaj bicikle ekskursis. Ni ankaŭ povis gimnastiki, manlabori, ĉeesti diversajn prelegojn (pri Katalunio, DNA, ŝvebotramo en Wuppertal, usona pentristo...), aŭ nur sidi, trinki, simple babili.

Vespere ni ĝuis plurajn belajn spektaklojn: unu koruso aparte plaĉis, pupteatraĵo ĉarmis nin, la juna kantisto Jonny M. entuziasmigis la publikon.

Tre agrabla semajno... por trejniĝi pri Esperanto kun simpatiaj parolantoj. Venu kun ni venontjare!

*Redaktis: Anna Dupéchaud*

## Enigma promenado en Bruĝo

Partoprenu en la "Enigma Promenado" tra la belga urbo Bruĝo **sabaton la $1^{an}$ de julio**. Sciu pli kaj aliĝu per la retejo: www.esperanto.be/brugge



**KOLOFONO**

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio.

Redaktis: Katja Boen, Xavier Dewidehem.
Enpaĝigis: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso: **kuriero@esperanto-nord.org**